

Esperanto-vivo en Svislando, 6-a parto
Kunlaboro intergrupa
Claude Gacond, 395-a radioprelego, 1971.05.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni alportos al vi informojn pri la esperanto-vivo en Svislando.

A.- Pasintan semajnon ni faris nigran priskribon pri la absoluta manko de kunlaboro inter la esperanto-grupoj de Svislando. Eble kelkaj geaŭdantoj opiniis, ke ni estas iomete severaj.

Cl.- Pro tio ni hodiaŭ vidos, kion ni nomas kunlaboro intergrupa.

A.- Ni havis la okazon aranĝi prelegvojaĝon por kelkaj eksterlandaj esperantistoj : fraŭlino Joŝiko Kaĵino, sinjoro Eizo Itoo, sinjoroj Umeda kaj Deguĉi el Japanio, gesinjoroj Hamwai el Novzelando kaj sinjoro Tibor Sekelj el Jugoslavio. Montriĝis preskaŭ neeble organizi iom racian rondveturon tra Svislando. Kaj pluraj grupoj nur ekinteresiĝis pri la proponita prelego, kiam la prelegisto jam alvenis en Svislando mem. Plurmonata antaŭa programado montriĝis vere neebla.

Cl.- Alian fojon ni organizis seminarion pri la instruado de esperanto laŭ la dialoga metodiko. Ni petis la grupojn sendi membron, subvencianta al li la veturadon. Kion ni konstatis ? Nur kelkaj grupoj reagis, poste ĝuste la nereagintaj grupoj deziris ekuzi tiun instruteknikon.

A.- Ekzistas en Svislando tutlanda esperanto-societo. Ĝis nun neniam ĝi povis baziĝi je la aktiva kunlaboro de ĉiuj lokaj grupoj. Pro tio la informado pri nia lingvo estas multe malpli efika, ol ĝi povus esti.

Cl.- La kaŭzoj al nekunlaboro estas plej diversaj. Kelkaj grupoj neniam kunlaboris kun la tutsvisa societo, kaj estus kiel rompo kun historia tradicio ŝanĝi tiun sintenon. Aliaj konsideras la kunlaboron tiel : unufoje en la jaro, okaze de la jarkunveno de Svisa Esperanto-Societo oni faras raporton pri la propra laboro.

A.- Fakte ni vidas en intergrupa kunlaboro ion multe pli kompleksan. Estus bone povi kunordigi diversajn agadojn, dividante la taskojn. Ĉiu grupo elektus taskon, kiun ĝi povus plenumi je la profito de la aliaj grupoj. La diseco geografia de la esperantistaro estas granda malforto, kiun simila intergrupa kunlaboro povus mildigi.

Cl.- Tiel unu grupo transprenus la respondecon redakti la revuon *Svisa Espero* ; alia okupiĝus pri la serĉado de reklamoj por tiu organo ; alia planadus la preleg-vojaĝojn intergrupajn, ne nur por eksterlandaj prelegistoj, sed ankaŭ por svisaj talentuloj ; alia okupiĝus pri la riĉigo de la esperanto-programo ĉe la radio pretigante radiofoniajn teatraĵetojn aŭ folietonojn plurvoĉajn ; ankaŭ pri la disvastigo de esperanto en diversajn mediojn povus okupiĝi grupo : en la lernejojn, en la komercon, en la turismon, en la kulturajn societojn. Ni povas vidi grupon, kiu okupiĝus pri la pretigado de inform-materialo ; alian kiu okupiĝus pri la redaktado de gazet-artikoloj ; ankoraŭ alian pri la tradukado de gravaj dokumentoj.

A.- La listo de la eblaj respondecoj estas multe pli longa, ol oni unuavide opinias. Imagu la forton de nacia movado, kiu povus kalkuli pri fakiĝintaj grupoj.

Cl.- La pasintan jaron en la grupo de La Chaux-de-Fonds, kiun ni gvidas, ni eksperimentis labor-kunsidojn. Unufoje ni pretigis afiŝojn por montro-fenestro. Alian fojon ni alfabeto ordigis librojn por la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Lingvo Internacia, kiu stariĝis en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Ambaŭfoje ni konstatis, ke tiuj kunvenoj estas agrablaj. Plenumante tiun utilan laboron ni multe ridis kaj ŝercis. Dum la venontaj monatoj ni volas provi reorganizi similajn labor-kunsidojn por helpi al la Centro de Dokumentado.

Esperanto-vivo en Svislando, 6-a parto
Kunlaboro intergrupa
Claude Gacond, 395-a radioprelego, 1971.05.05 & 08

A.- Tiuj respondecoj, kiujn la grupoj elektus, donus subite novan dimension al la grupa laboro. Sed ili povos esti organizitaj, nur kiam minimuma intergrupa kunlaboro estos organizita. De baldaŭ dudek jaroj ni sopiradas al tutsvisa kunsido, kiu grupigus la prezidantojn aŭ delegitojn respondecajn de la lokaj grupoj. Ĝis nun neniam simila kunveno povis estis organizita pro manko de kunlaboremo inter la tutsvisa societo kaj la lokaj grupoj.

Cl.- Ni ne scias, kiel estas la situacio en la aliaj landoj, sed ni estas pli kaj pli certaj, ke tiom longe kiam la lokaj grupoj ne povos kunlabori, estos preskaŭ vane planadi sukcesajn inform-kampanjojn pri esperanto.

A.- La pasintan jaron, kiel ni menciis en pasinta prelego, en kunlaboro inter Svisa Esperanto-Societo kaj Kultura Centro Esperantista, estis organizita varb-kampanjo per senpaga dissendado de la revuo *Svisa Espero*. Nun alvenis la momento dissendi aliĝilojn al la 80 unuaj profitintoj de tiu unujara senpaga ricevado de *Svisa Espero*. Bedaŭrinde, ĉar ne povis okazi interkonsento inter la grupoj, oni varbas nur por la tutsvisa societo, forlasante la sisteman varbadon por la lokaj societoj.

Cl.- Por povi varbi por ambaŭ movadaj dimensioj, necesus, ke la kotizoj de la lokaj grupoj formu tuton kun tiu de la svisa societo. Eĉ nur diskuti pri tiu novaĵo montriĝis neeble, ne nur flanke de la grupoj, sed ankaŭ flanke de la tutsvisa societo. Tamen nun, kiam komenciĝis la varbkampanjo, ambaŭflanke oni malkovras la sencecon pri tiu nekunordigita agado. Eble el tiu lastminuta ŝoko ekĝermos deziro pri vera kaj racia kunlaboro.

A.- Ni parolis pri tiuj ne tre agrablaj flankoj de la svisa esperanto-vivo, por montri la kompleksecon de la mondlingva problemo. Esperanto grupigas homojn. Aŭtomate ĝi ne estas nura lingva afero, sed antaŭ ĉio socia fenomeno. Ni scias, kiel malfacile la esperantistoj akceptis en la komenco de nia jarcento la kreadon de tutmonda asocio kaj de Akademio. Nun la tiamaj timoj ŝajnas al ni ridindaj. Same ridindaj ŝajnos al niaj posteuloj la nunaj provoj bremsi la formiĝon de ĉiam pli kompleksaj interrilatoj inter la esperanto-societoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-